



VIVI INTER RUINOJ

En januaro(*) estos la tria datreveno de la venko en Kobano super la Islama Ŝtato. La situacio estas “ege sekura”, klarigis Ibrahim Haj Khalil sed por la rekonstruad-laboroj oni havas grandajn bezonojn.

La Batalo de Kobano okazis inter la 15-a de septembro de 2014 kaj la 27-a de januaro de 2015. Tiu urbo de Roĵavo(1) estiĝis ĝuste simbolo de la lukto de la kurda popolo kontraŭ la Islama Ŝtato. Kobano havis 400 000 loĝantojn kaj ĝi ŝanĝis la direkton de la milito. “Kobano nun estas ege sekura, komparante ĝin kun la ceteraj regionoj de Sirio; fakte, en la provinco ne okazis atakoj delonge”, asertis Ibrahim Haj Khalil (Kobano, 1982) kaj aldonis, ke oni rekonstruas 40 %-on el ĝi. “Nun kaj tie ĉi, laŭ ordo de prioritatoj, jen kion oni bezonas: elektron, akvon, kloako-sistemon, ŝoseojn, konstrumaterialon, maŝinaron, teknikajn konojn kaj materian kaj ekonomian helpon”.

El Kobano kaj ties apudaj vilaĝetoj forfuĝis pli ol 300 000 homoj – 90 % el la loĝantaro -, laŭ peto de la memdefendaj fortoj, kaj ili rifuĝas en teritorio de Turkio. Iom post iom ili estas revenantaj. Sed la panoramo estas malĝojiga. La bataloj difektis 80 %-on de la urbo. Estis detruitaj 4284 konstruaĵoj, aliaj 5864 suferis damaĝojn kaj nur 630 restis sendifektaj.

Rohin Mohammed Ali (Kobano, 1992) kaj Khalil kunpartigas la urbestradon de Kobano; fakte, laŭ la sistemo de demokrata memmastrado starigita en Roĵavo, oni devas elekti du personojn por la direktorecon: viron kaj inon. Dum la longaj kaj dubaj batalagoj daŭris, ambaŭ restis en la urbo.

Pli ol 70 % el la delokitaj civitanoj revenis en la urbon kaj ĝin komencis rekonstrui. Se ĝis nun oni povis multon fari, tio estas danke al la partopreno de la civitanoj. Ili faris sia la memmastrumadan sistemon kaj starigis sin je la servo de la urbo kaj de la urbaj instancoj. “La civitanoj prilaboras la problemojn kaj ties solvojn dum la komunumaj kunsidoj. En tiuj kunvenoj oni prenas la decidojn”, klarigis Khalil.

Edukado kaj Sano

Speciala trajto de la eksperimento prilaborata en la tuta Roĵavo estas la asamblea sistemo kaj alia estas, sendube, la rimarkinda ĉefroleco de la virinoj. “Virinoj estas la duono de nia socio kaj sammezure ili estas reprezentantoj en la institucioj de la demokrata memregado”, diras Ali.

Antaŭ la batalo, 46 konstruaĵoj estis uzataj por publikaj servoj kaj, el tiuj, 16 estis tute detruitaj. La ceterajn 30 oni provizore restarigis, aŭ ili estas riparataj. La lernejoj estas la plej damaĝitaj, kun konstruaĵoj difektitaj inter 20 kaj 70 %-e. Plejmulto de la sanservaj konstruaĵoj de la orienta urboparto estis detruitaj aŭ grave damaĝitaj.

Plej grandan zorgon kreas la san- kaj edukservo. “La lernejoj estis ĉefa celo por la agresantoj de la Islama Ŝtato, kaj oni faris intensan klopodon por ilin restarigi, eĉ se provizore. La memmastruma registaro forte laboras, por ke ĉiu povu edukiĝi en sia gepatra lingvo”, substrekis Khalil.

La lernindaĵoj, kiujn oni instruas en tiuj instalaĵoj celas la riĉecon de la lingva diverseco kaj de la malsamaj popolkulturoj. “En niaj lernejoj ni utiligas novan lernotaĵprogramon. La memmastruma registaro ĝin verkis, kaj ĝi havas tri bazojn: kulturon, lingvojn kaj sciencon. La lernantoj ĵus komencis regule vizitadi la lernejojn”, diris Ali. “Sed ankoraŭ mankas multaj aferoj. Ĝuste necesas vartejoj kaj novaj lernejoj, ĉar tro da lernantoj amasiĝas en la klasĉambroj. Kaj, inter aliaj, ni bezonas lernolibrojn kaj modernajn sciencajn ilojn kaj ekipaĵon; bazajn aĵojn, kiel printilojn kaj komputilojn. Kaj ni devas tuj starigi universitatan instruadon”.

La milito kreis multajn bezonojn al la civitanoj en la sanserva fako. “En la provinco estas preskaŭ nenio”, diris Khalilek. “Ne estas medikamentoj nek ekipaĵo nek kuracistoj nek flegistoj; sed pleje mankas hospitaloj. Plejmulto de la ejoj, kiuj ankoraŭ funkcias, estas ambulatorioj”.

Nune, ĉefa celo estas refortigi la lokan ekonomion de la tuta regiono kaj, por tion atingi, oni volas stimuli kaj instrui, per la organizado de kooperativa modelo permanenta, kulturon de komunuma ekonomio. De tri jaroj oni ne kultivis la fekundajn terojn ĉirkaŭ la urbo kaj, por ilin konvene ekspluati, oni bezonas instali irigacian sistemon – el la rivero Eŭfrato, je 17 kilometroj for de la urbo -, ripari la maŝinaron, kiun la IŜ difektis aŭ ŝtelis, kaj instruigi laboristojn specialigitajn je agronomio. Laŭ freŝa esplorlaboro de dana organizo, tiu grundo estas konvena por planti kotonon, olivon, grenaton, pistakon kaj beton.

Problemoj kun la elektro

Post la batalo, Kobano kaj ties ĉirkaŭaĵo estiĝis rifuĝejo por tiuj, kiuj forfuĝis el la milito en aliaj teritorioj. La rifuĝintoj vivas en la kamparo kaj, spite al la streboj de la institucioj, la vivkondiĉoj estas vere penigaj. “Ni klopodas oferti komfortan lokon al la rifuĝintoj kaj respondi al iliaj bazaj bezonoj. Sed ni ne disponas sufiĉajn rimedojn, nek povas atingi ĉiujn lokojn”, diris Ali.

De 2012 la tuta aŭtonoma regiono de Roĵavo havas interrompita la elektroprovizadon, ĉar tiam la ĝihadistoj de la Fronto de la Venko⁽²⁾ kaptis la strategian basenon de Tiŝrino⁽³⁾ – kiu provizas per elektro la tutan nordon de Sirio -, kiun poste forprenis de ili la IŜ. Kvankam la defendmilioj de Roĵavo kaptis tiun basenon, en la tuta regiono oni devas uzi nepre pezajn, multekostajn kaj poluajn dizelgeneratorojn, kaj la elektroprovizo ankoraŭ ne sufiĉas.

Pri la internacia helpo la du respondeculoj parolis ĉagrene: “Dum la tempo de la heroa rezistado de Kobano kontraŭ la Islama Ŝtato kaj poste, la geamikoj de la kurda popolo el la tuta mondo donis al ni grandan subtenon moralan kaj mediatan; sed ni devas diri, ke la internacia komunumo ne plenumis sian vorton. Oni promesis helpon por rekonstrui nian urbon, sed la loĝantoj ricevis nenion, aŭ malmulto atingas ilin”.

Notoj: (Nomoj en la kurda lingvo, krom la indikitaj)

(1) Okcidenta Kurdio/Roĵavayê Kurdistanê. La kurda teritorio ene de la siria ŝtato.

(2) Jabhat al-Nusra, en la araba.

(3) Tishrin.

KLARIGOJ:

Aŭtoro: Orsola Casagrande.

(*) Originale aperis en la eŭska ĵurnalo Berrria la 13-an de Septembro 2017-a.

Tradukis: NXC. Januaro 2018-a. Provlegis: DS.

